

# bulgara esperantisto

MONATA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO  
Rekomendita de la M-rio de publika instruado per cirkulero № 5677 de 3. II. 1938

JARO XXI

SOFIA

20 JUNIO, 1940



## KAJ TAMEN...

Venis denove malbonaj tempoj por la mondo kaj speciale por Eŭropo. Denove la milito furiozas kaj detruas valoraĵojn, kreitajn dum multaj jaroj.

En la nunaj tagoj mankas favoraj cirkonstancoj por kultura krea laboro en la popoloj. La atento de ĉiuj estas direktata aliflanken — al la milito.

Kaj tamen ni ne malesperu. La milito, kiel ĉiu malbona epizodo — necesa aŭ ne — ne daŭros eterne. Venos, pli aŭ malpli frue, ĝia fino kaj venos denove la tempo de normala vivo de la popoloj kaj inter la popoloj. Tiam denove nia Esperanto trovos sian lokon inter la kulturaj valoraĵoj kaj denove oni pritaksos kaj ŝatos ĝin laŭmerite.

Nia nuna tasko devas esti, konservi la kreitajn Esperanto-fortojn, por ke, kiam pasos la monda uragano kaj venos denove la momento de paca kultura laboro, ĝi trovi nin pretaj por organizita agado por la bono de nia popolo kaj de la tuta homaro.

Ne malesperi, resti ĉiam optimisto, atendi ĉiam pli bonajn tempojn, kredi en la bono — tio estas kaj devas esti la karaktero de ĉiu esperantisto!

*Ada*

## И ВСЕ ПАКЪ...

Отново дойдоха лоши времена за свѣта и специално за Европа. Отново войната бѣснѣе и разрушава ценности, създавани презъ много години.

Въ днешнитѣ дни липсватъ благоприятни условия за културна творческа работа въ народитѣ. Вниманието на всички се насочва другаде — къмъ войната.

И все пакъ, да не се отчайваме. Войната, като всѣки лошъ епизодъ — необходимъ или не — не ще трае вѣчно. Ще дойде, рано или късно, нейниятъ край и ще дойде отново времето на нормаленъ животъ на народитѣ и между народитѣ. Тогава отново нашиятъ Есперанто ще намѣри своето мѣсто между културнитѣ ценности и отново ще го оценятъ и тачатъ заслужено.

Нашата сегашна задача трѣбва да бжде, да запазимъ създаденитѣ есперантски сили, та, когато премине свѣтовната буря и настѣпи отново моментътъ за мирна културна работа, той да ни завари готови за организирана дейностъ за доброто на нашия народъ и на цѣлото човѣчество.

Да не се отчайва, да остане винаги оптимистъ, да очаква винаги по-добри дни, да вѣрва въ доброто — това е и трѣбва да бжде характерната черта на всѣки есперантистъ!

*Ада*

JANA JAZOVA

## MALRIĈAJ VORTOJ

En sakon la kelkajn monerojn de l'plado mi ŝutis,  
kuntiris la jupon ŝiritan, restintan sen farb',  
sidiĝis sur strato — kaj jen la lamulo ekludis  
per guzlo sub bru' veturila kontraŭe sub arb'.

Kaj pensas mi tiam: pro kia bezono li ludas?  
Ridinde, li vortas pri mi, mi lin aŭdas tra l'bru':  
al almozulino sur brua strat' kiu sin trudas?  
sed panon li volas dividi kun mi de nun plu.

Grumblas la sonoj tremantaj kaj poste kriemaj  
ekkvikas sub ĉaroj kaj aŭtoj, en lukto sen ord'.  
Li eble eĉ fingrojn ne havas kaj ludas mantreme,  
aŭ eble terure doloras al li en la kor'.

Kaj nun mi hezitas, ĉu kontraŭ li resti denove,  
aŭ kuri al parko de li en ĉi tiu vesper'?  
Geviroj — post la ŝprucfontan' kunpremitaj senmove. . .  
Rigard' mia — flamoj, korpsvelton ĉu fuŝas mizer'?

Singultis kaj ĉesis lamul' mia, arĉo sin ŝiris,  
aŭ eble al li ĵetis levon neniŭ al plad'.  
Ĉu ne tamen mia pens' brogis lin, trist' kaj deziro,  
aŭ eble jam falis sub ĉarojn premita de l'rad'...

Por li tio estas la riĉaj kaleŝoj en morto,  
kaj estas en urba kanal' mia lit' de virgin'.  
Ĉirkaŭe protezoj du frapas sur ŝtonoj kun forto,  
ĉirkaŭe li serĉas la amon de mi kun obstin'.

## JUNIO

Hieraŭ mi same vin longe atendis  
sur sojl', trans barilon rigardis sen ĝoj'.  
Postnubis la lun', pluv' min rosis momente  
kaj viŝis la polvon sur granda ŝtonvoj'.

Kaj ree sur ĝi estis klare, mi vidis.  
Kaj ĉiu ajn ombr' ne similis plu vin. . .  
Knabinoj promenis brakitaj. . . kaj ridis  
pro io flustrata de l' knab' al knabin'.

Min levis tro frue dolor' kaj malseko el lito.  
Malfermis mi mian pordegon kun kri' —  
jen viaj paŝsignoj per kot' ĉe la sojlo stampitaj!  
Vi venis dum nokt', malespera, por mi?

Vi tamen saltinte freneza barilon,  
pro kio ne saltis fenestron, amat'?  
Dum trist' via — skuas min ĝoja jubilo,  
kaj freŝa kaj bela alvenas novdat'!

Trad. Miti.

**Jana Jazova** (literatura nomo de Ljuba Gančeva), bulgara lirika poetino. Ŝi naskiĝis dum 1912 en Lom, komerca urbo sur la Danubo, finis gimnazion kaj universitaton (slavan filologion) en Sofia.

Ŝia liriko distingiĝas per originalaj inventoj kaj kuraĝaj vizioj. De ŝi estas eldonitaj kelkaj versaĵaroj: Jazove (Digoj, 1932), Bunt (Ribelo, 1933), Krâstove (Krucoj, 1934) kaj romano Kapitano (1939).

JORDAN JOVKOV

## LA LUPINO

Antaŭ ol ĝi komencis fari malbonojn, Petro la paŝtisto vidis la lupinon, pri kiu oni parolis, ke ĝi naskis en la grenkampo kaj ke ĝi vagas en la ĉirkaŭaĵo. Pli frue ĝi kredeble persekutis la ĉasaĵon, kiun ĝi povis kapti aŭ ne atentigante pri si, ĝi serĉis rabaĵon pli malproksimen. Nun incitite kaj arogante eble, ĉar ĝi mamnutris, ĝi atakis ankaŭ la ĉi tiean brutaron, faris ofte grandajn malbonojn, ke oni povus opinii, ke la lupoj estas tuta luparo.

— Priatentu, knabo! — diris Petro la paŝtisto al Davidko, la pli juna paŝtisto en la farmo. — Priatentu, se vi ne volas reveni iun tagon sen ŝafaro! La lupo, knabo, estas malbona lupaĉo: unu beston ĝi manĝos, cent bestojn ĝi mortigos. . .

Davidko metis la panon en la sakon kaj pririditis.

— Returnu vin kaj ĉirkaŭrigardu! Gardu vin! Rigardu pli ofte tiun flankon, al kiu blovas la vento — la lupo, mia knabo, venas sub la blovo de la vento. Tion vi sciu! . . . Kial vi ridas? — subite ekkolieris Petro la paŝtisto. — Se mi rakontus al vi pri la lupoj, vi devus aŭskulti. Kia paŝtisto vi estas! . .

— Kial, avo Petro, kial vi incitas min? — koleriĝis Davidko. — Mi ne timas la lupon! Kio estas la lupo? Hundo. Mi ne priatentas ĝin.

Petro la paŝtisto estis konsternita, kvazaŭ iu frapis lin, ekrigardis Davidkon, ekkriis. Kaj antaŭ ol komenci riproĉi lin, Petro rigardis lin de la kapo ĝis la piedoj. Kaj jen io gaja ekbriletis sub liaj blankaj brovoj, li ekriditis: Davidko plenreskis kiel bastonego, alta, ŝultroza, kun longaj kruroj, kun longaj manoj. Li havas la staturon de giganto, kaj lia vizaĝo ne ŝanĝiĝis, ĝi estis senbarba, knaba.

— Veron diras Davidko! — diris al

si Petro. — Ĉu lupo povas ataki tiun-ĉi giganton?

— Se la lupo estus eĉ hundo, — pacige aldonis Petro, — vi ĉirkaŭrigardu! Ĝi estas lupaĉo. Vi ne kredu ĝin! Kaj mi ne kredas la famon, ke la lupino naskis en la grenkampo. Ĝi estas tie, tie-en la arbaro. Vere la arbaro estas malproksima kvin aŭ ses horojn de tie-ĉi, sed ĉu tio-ĉi estas vojo por unu lupo-nur promeno.

Li denove alrigardis la altan staturon de Davidko kaj daŭrigis:

— Vi estas forta, Davidko, vi estas fortega. Tiun-ĉi lupinon mi konis la pasintan vintron. Ankoraŭ tiam mi vidis ĝin. Mi rigardas la neĝon: tri paŝojn kaj unu cikatron. . .

— Kian cikatron? — demandis Davidko.

— Tiam la lupino lamis. Ĝia malsana piedo ne povis alpaŝi, kaj ĝi nur cikatris la neĝon.

— Ĝi lamentas ankaŭ nun, — diris Davidko. — Mi vidis ĝin lamanta.

Davidko kunprenis la sakon, la bastonon kaj eliris.

— Pririgardu, pririgardu! — post li kriis Petro.

Davidko priridis Petron, sed restinte sola en la kamparo, kiam ne estis lumo kaj estis mallume, li ofte prirememoris la lupon. Tiam li kunvenigis dense la gregon, la sonoriloj ektintis laŭte, la ŝafoj paŝis antaŭ li kiel truparo. Davidko alvokis per laŭta voĉo la hundojn, kiel agas la paŝtistoj kaj senkaŭze li pafis per sia revolvero.

Tiujn tagojn la paŝtistoj priparolis nur la lupinon kaj ĉiu rakontis tion, kion li sciis. Oni konkludis, ke la lupino restis de tiu luparo, kiu vagis la vintron tra la vilaĝoj apude. Tiam estis danĝere marŝi survoje, ĉar lupino el la luparo furiozis

(eble ĝi estis la sama lupino). Kaj oni scias, ke se la lupino atakus ion-ĉasaĵon, bruton aŭ eĉ homon-la tuta luparo atakus ĝin per plej teruriga sangavido.

Longan tempon la lupoj vagis meze de la neĝblovoj tra la kamparo kaj oni vidis nur iliajn postsignojn sur la neĝo. Iliaj sangozaj atakoj tedis al la vilaĝanoj, formiĝis persekutaro por forpeli ilin. Tiam unu lupo ekaperis tie-ĉi. Komence ĝi estis lamanta, kiel ĝin vidis ankaŭ Petro la paŝtisto. Sendube la lupo estis neniu alia ol tiu-ĉi lupino. Dum la persekutado oni ĝin vundis kaj ĝi saviĝis tie-ĉi. Nun la grenkampoj spikiĝis kaj ĝi povis kaŝiĝi ĉien.

— Ĝi finis, la afero estas jam finita! — iufoje Davidkon renkontis Petro. — La du ĉasistoj el Sârnenon, la fratoj Enĉev, ĉu vi konas ilin? Ili trovis la kaŝejojn de la lupino, ili kunprenis la lupidojn. Tri. Ili alportis ilin vilaĝen.

— Vi mensogas min, — diris Davidko.

— Pro kio mensogi, ili alportis ilin. Nun ili gardostaras por mortigi ankaŭ ŝin, la lupinon. Ili ja estas spertaj ĉasistoj. Ili mortigos ĝin.

Ĝuste nun, kiam oni pleje priparolis ĝin, la lupino kvazaŭ dronis en la teron. La fratoj Enĉev, la ĉasistoj, gardostaris, sed ili povis vidi ĝin nek unufoje. Neniu sciis ion pri ĝi. Preninte ĝiajn lupidojn, ili terurigis ĝin kaj ĝi forkuris. Reveninte de la muelejo kaj preterpasinte la Imaret-arbaron, iuj vilaĝanoj rakontis, ke ili aŭdis lupon hurlanta interne en la arbaro.

Tiel pasis kvin-ses tagoj pli. Subite la lupino sciigis pri si kaj per teruriga maniero komprenigis, ke ĝi estas tie-ĉi. Apud la arbaro en iu ŝafejo el pli ol sepdek kaproj la duonon ĝi mortigis. Multan brutaron ĝi ankaŭ grave vundis kaj ĝi estis buĉenda. Sed iun nokton la plej terurigaĵo, kien oni alkondukis la lupidojn: io eniras en la vilaĝon, oni aŭdas vekriadon, la hundoj bojas, kvikas, la terurigita brutaro blekegas, lo iras de korto al korto, sed neniu kuraĝas eliri eksteren. La fratoj Enĉev, la ĉasistoj, tiun nokton ne estis en la vilaĝo. Nur unu kuraĝa vilaĝano ekrigardis tra la fenestro kaj en la helo li vidis la lupinon: maldikan, longan, kun ŝvelintaj mamoj, spireganta pro laceco, kun pendinta lango.

Kiel oni diris, en la vilaĝo ne estas domo, kie ĝi ne mortigis bruton. Kvazaŭ pesto traflugis la bestaron. Petro, la paŝtisto, subite tre zorgiĝis.

— He, Davidko, ĉu vi vidis, Davidko?

— parolis li. — Ĉu la lupo estas hundo? Ĉu vi vidis, kion la lupo faris en Sârnenon? He! Estu pripensa, ĉar aliokaze ni restos sen ŝafoj. Se ĝi atakus nin...

— Ke ĝi venu! — ridis Davidko. — ke ĝi venu!...

La lupo kvazaŭ aŭdis lin kaj venis. Iun vesperon krepuske la lupino subite atakis la gregon kaj rabis unu ŝafon—ĝi rabis ĝin antaŭ Davidko mem. Kaj kiel ĝi portis ĝin! Mordinte ĝian kolon, ĝi surmetis ĝin malantaŭen sur sian dorson kaj ĝin portis. Davidko ekkriis — la hundoj restis malantaŭe — li levis la bastonegon, sed la ŝafoj rekkuris timigite, li opiniis, ke ankaŭ aliaj lupoj atakis, kaj dume la lupino malaperis en la mallumon. La venontan tagon sur tiu-ĉi loko restis nur iom da lano.

Davidko malafabliĝis. Ili estis silentema. Petro, la paŝtisto, hezitis primoketi lin. Kaj kvankam li vigle gardostaris kaj atentis, la lupino ree venis. Kaj ree okazis io tre mirinda por li kaj lia forto-li denove konfuziĝis kaj li nur videndis nun la luno brilis-la lupino forrabis la ŝafon. Nun ĝi kaptis ĝin per la dentoj je la ŝultro kaj kurigis ĝin, kaj frapis ĝin per la vosto, kiel frapus ĝin la paŝtisto, se li kondukus ĝin. Ankaŭ tiun fojon la lupino forŝiris kaj manĝis la ŝafon, malproksimiĝinte kaj malaperinte en la mallumo-ducent-tricent paŝojn de la grego.

Post tiu okazaĵo Davidko kvazaŭ febotremis. Per laŭta voĉo li rakontis al Petro, la paŝtisto, kiel ĝi okazis, senkulpiĝis, klarigis, pro kio li ne mortfrapis la lupinon per sia bastonego. Lia voĉo estis subtila kaj grakanta kiel infana voĉo kaj ĝi ne decidis al lia granda korpo. Poste Davidko eksilentis, manapogis la senbarban vizaĝon, ekpensis kaj liaj okuloj baniĝis en larmoj.

Dume la lupino malproksimiĝis de la farmo kaj daŭrigis aliloken siajn rabaĵojn. La fratoj Enĉev konstante gardostaris apud ĝiaj kaŝejoj, sed okazis, ke ĝi ne venis tien, kien ili gardatendis ĝin. Internen en la arbaron ili malkovris ankaŭ

aliajn kaŝejojn, kiujn pli frue ili ne konis, en kiuj iam la lupino kaŝiĝis kun sia idaro. Tie-ĉi ili trovis jen kapon, jen kruron de ĵus mortigita bruto. Ili estis netuŝitaj, sangitaj ankoraŭ, ŝutitaj de muŝoj.

Iufoje la lupino ĉirkaŭevagis la farmon, ŝteliris en la gregojn — tion ja oni poste eksciis — ĝi preterpasis bovinojn, kiuj paŝtis kun siaj bovidoj. Sur ĝia vojo ekstaris nebone gardata bestaro, sed ĝi foriris, atakinte neniun bruton. Ĝi komprenigis tion-ĉi: nokte malproksime en la kamparo oni aŭdis ĝin hurlanta en la malumo. Tiu-ĉi hurlo estis potenca, teruriga, sed subite ĝi ĉesis, mallaŭtiĝis, raŭkis kaj jen ĝi ĉesis abrupte, jen ĝi daŭris plende, malgaje, kvazaŭ ĝi vokis iun. . .

Iun matenon unu aŭ du horojn antaŭ ol la tagiĝo Davidko haltigis la ŝafojn ĉe voje kaj paŝtinte, ili kuŝiĝis. Venero jam leviĝis, kaj iom poste la luno-flava, breĉoza. Davidko ne kuŝiĝis, sed li preterpaŝis jen de unu, jen de la alia flanko de la grego. Subite la ŝafoj timiĝis, disiĝis kaj sur tiu loko sur la vojo mem aperis la lupino. Ĝi staris sur la vojo, kvazaŭ ĝi ne volis ataki la ŝafojn, sed ĝi ŝajne ekiris ien. Tio-ĉi daŭris nur momenton. Davidko ekkriis—kiel sovaĝa, nehoma estis lia voĉo! — Li levis la bastonegon, sed li ne povis ĝin frapi: la lupino saltis sur lin kiel kato, pendis sur lia brusto, ekmordis lin, ekdisŝiris la vestojn. Davidko ellasis la bastonegon, malleviĝis kaj prenis la lupinon per la ambaŭ manoj.

Tagiĝis. La suno leviĝis alten-kaj ĉio jam estis finita: oni kunvenigis la disigitajn ŝafojn. Davidkon oni alkondukis en la malsanulejon la tutan mordita, vundita, la tutan en sango, kaj la lupino kuŝis mortinta sur la herbon. Vilaĝanoj kunvenis, multaj vilaĝanoj iris konstante.

— Davidko rakontis al mi, — parolis Petro, la paŝtisto, fiere, sed emociite. — Terurigaĵo . . . Ĉu vi opinias, ke estas facile lukti kun lupino per manoj? Ĝi mordis min, diris li, mi volvis la kubuton jen tiel kaj ĝin enigis en ĝian buŝon por mordi ĝin; tiel, li diris, doloris pli malmulte. Forta sovaĝbestaĉo! . .

Petro, la paŝtisto, eksilentas kaj ekrigardas la lupinon. Ĝiaj okuloj estas malfermitaj kaj ili rigardas al la kamparo. Petro, la paŝtisto, rememoras iun dirinta ke kiu pribedaŭras ion en la mondo, tiu mortas kun malfermitaj okuloj. Li nur pripensas ĝin, ne diras ĝin kaj daŭrigas:

— Forta bestaĉo, oni venkas ĝin malfacile. Longan tempon ili baraktis. Jen Davidko venkas, jen la lupino. Kaj li sukcesas salti sur ĝin, rajdas ĝin; kaptas ĝin per unu mano, kaj per la alia eligas la pordon kaj frapas, frapadas... Kaj kia fortika animo — ĝi eligas kaj volas fugi. Tiam Davidko ekprenas la bastonegon kaj finmortigas ĝin per ĝi.

Petro, la paŝtisto, ekrigardas la lupinon, kraĉas, li volas piedbati ĝin, sed li renkontas denove la rigardon de ĝiaj mortintaj vitrecaj okuloj kaj tio-ĉi konfuzas lin.

— Vidu ĝin, ĝi rigardas! — li diras.

— Ĉi mortis kun malfermitaj okuloj. . .

Ĉirkaŭe la vilaĝanoj ekparolis laŭte. . .

El la bulgara G. H.

**Jordan Jovkov** estis unu el la plej bonaj nuntempaj bulgaraj beletristoj kaj dramverkistoj. Naskiĝis en vil. Ĝeravna (Kotlensko) dum 1884 j., sed vivis en vil. Ĉifutkjoj (Dobriĉko), finis gimnazion en Sofia, kie studis ian tempon juron. Antaŭ la Balkana milito li estis instruisto en diversaj vilaĝoj en Dobruĝa, poste li estis oficisto en la bulgara legacio en Bucarest. Jovkov konas bone la vilaĝon, precipe tiun en Dobruĝa. Li rakontas verve, estas profunda psikologo, granda poeto. Liaj dramoj estas ludataj en la Nacia teatro en Sofia kaj en la provincaj teatroj grand sukcese. Li mortis dum 1937 j. en Plovdiv.

Jovkov estas aŭtoro de: Rakontoj, v. I (1917), Rakontoj, v. II (1918), La rikoltisto (Ĵetvarjat, 1920), Lasta ĝojo (rakontoj, 1926), Balkanaj legendoj (1927), Vesperoj en la Antimova drinkejo (rakontoj, 1928), Samvilaĝanoj (Zemljaci, rakontoj, 1928), Albena (dramo, 1930), La milionulo (komedio, 1930), Rakontoj, v. III (1932), Borjana (dramo, 1932), La farmo bieno ĉe la limo (romano, 1933), Virina koro (rakontoj, 1935) k. c.

# УСТАВЪ

## на културно-просвѣтната организация „Български есперантски съюзъ“

### ГЛАВА I. — ОБЩИ НАЧАЛА, ИМЕ И СЕДАЛИЩЕ

Чл. 1. Основава се културно-просвѣтна организация „Български есперантски съюзъ“ съ седалище София.

Чл. 2. Целитѣ на Съюза сж: а) да разпространява международния помагаленъ езикъ есперанто така, както е изложенъ въ „Фундаменто де есперанто“ отъ автора на езика д-ръ Л. Л. Заменхофъ и въ литературнитѣ и технически съчинения, писани отъ него; б) да запознава чрезъ езика есперанто външния свѣтъ съ историята и културата на българския народъ, съ стопанството и красотитѣ на българската земя, както и изобщо съ българската кауза, като девизътъ на Съюза е „Чрезъ есперанто за България“; в) да улеснява практическото използване на езика отъ членоветѣ на Съюза; г) да централизира, ръководи и контролира всичко, което се отнася до езика и до есперантското движение въ страната.

Чл. 3. Съюзътъ преследва целитѣ си съ следнитѣ срѣдства: а) издава безплатни хвърчащи листове и евтини, по възможностъ, безплатни учебници по есперанто; б) свиква и урежда пропагандични събрания, сказки и др. тѣмъ подобни; в) отваря курсове за изучаване есперанто г) издава органъ; д) контролира излизащитѣ въ България учебници за изучаването на есперанто и книги, написани на него, като по този въпросъ Съюзътъ взема своето становище, което съобщава на дружествата и съюзнитѣ членове и го прави достояние на обществото; е) събира статистически сведения за есперантското движение въ България; ж) грижи се за по-лесното снабдяване на членоветѣ си съ литература и учебници по есперанто; з) влиза въ сношение за съвмѣстна дейность съ други сродни сдружения.

Чл. 4. Съюзътъ е неутраленъ спрямо всички расови, политически, религиозни и социални въпроси въ страната и вънъ отъ нея.

### ГЛАВА II. — СЪСТАВЪ, ЧЛЕНСТВО

Чл. 5. Съюзътъ се състои отъ мѣстни дружества и индивидуални членове,

Чл. 6. Индивидуалнитѣ членове биватъ: спомагателни, благодетелни и почетни.

Чл. 7. Спомагателни сж тия, които искайки да подпомогнатъ Съюза морално и материално, плащатъ опредѣлена членска вноска.

Чл. 8. Благодетелни сж тия, които подарятъ най-малко 500 лева наведнѣжъ на Съюза.

Чл. 9. Почетни сж тия, които сж пренесли важни заслуги на есперантското движение.

Чл. 10. Благодетелнитѣ членове се провъзгласяватъ отъ Управителния съветъ, а почетнитѣ — отъ конгреса.

Чл. 11. Въ градове и села, дето нѣма дружества, есперантиститѣ се присъединяватъ къмъ най-близкото мѣстно дружество. Дето има по-вече отъ петъ члена, тѣ могатъ да си образуватъ дружество. Мѣстнитѣ дружества се ръководятъ отъ мѣстни комитети.

**З а б е л е ж к а:** Управителниятъ съветъ опредѣля районитѣ на мѣстнитѣ дружества. Есперантиститѣ, които по една или друга причина не могатъ да се присъединятъ къмъ нѣкое близко дружество, образуватъ отдѣлна група при Съюза, на която дѣлата се водятъ отъ секретаря.

Чл. 12. Мѣстнитѣ дружества съобщаватъ незабавно за избирането си на Управителния съветъ.

Чл. 13. Всѣко мѣстно д-во се сношава редовно съ Управителния съветъ и Редакционния комитетъ. Всѣки три месеца то дава сведения на Управителния съветъ за дейността си и за състава на дружеството.

Чл. 14. По въпроси отъ широкъ съюзенъ характеръ мѣстнитѣ д-ва трѣбва да искватъ и мнението на Управителния съветъ.

Чл. 15. Въ едно населено мѣсто може да сѣществува само едно дружество. Въ голѣмитѣ градове може да се образуватъ, споредъ нуждитѣ, и секции къмъ мѣстното дружество, като последното ръководи и контролира цѣлостната дейность на секциитѣ.

Чл. 16. Всѣки членъ има право да получава безплатнитѣ издания на Съюза.

Забележка: Никое дружество нѣма право да издава свой периодиченъ органъ безъ разрешението на Управителния съветъ.

Чл. 17. На конгреситѣ дружествата се представляватъ отъ делегати, избирани по единъ на всѣки десетъ члена или дробъ отъ десетъ члена.

Чл. 18. Дружества, които не могатъ да делегиратъ свои членове на конгреса, могатъ да избиратъ за делегати и членове отъ други дружества, които ще посетятъ конгреса.

Чл. 19. Взетитѣ на конгреса решения сѣ задължителни за всички дружества и членове.

Чл. 20. Членството се прекратява по лично желание (отписване), заличаване отъ списъцитѣ и изключване.

Чл. 21. Преставя да бѣде членъ оня, който не си плати членския вносъ.

Чл. 22. Изключва се оня, който работи въ противовесъ на съюзнитѣ цели, или който съ поведението си уронва престижа на Съюза.

### ГЛАВА III. — ПРИХОДИ И РАЗХОДИ

Чл. 23. Приходитѣ на Съюза сѣ: а) членски вноски; б) издания; в) абонаментъ; г) волни пожертвования; д) субсидии и др.

Чл. 24. За всѣки членъ дружествата плащатъ въ касата на Съюза годишна вноска, размѣрѣтъ на която се опредѣля отъ конгреса съобразно съ условията.

Чл. 25. Приходитѣ и разходитѣ се опредѣлятъ и ставатъ съобразно приетия отъ конгреса бюджетъ. Разходитѣ биватъ за: пропаганда, списание и издания, канцелария, заплати и разни.

### ГЛАВА IV. — УПРАВЛЕНИЕ

Чл. 26. Дѣлата на Съюза се водятъ отъ Управителния съветъ, състоящъ се отъ 7 души съюзни членове, избрани съ тайно гласоподаване.

Чл. 27. Управителниятъ съветъ избира помежду си: председателъ, подпредседателъ, секретаръ, касиеръ, библиотекаръ, редакционенъ комитетъ и др. споредъ нуждитѣ.

Чл. 28. Управителниятъ съветъ свиква съюзнитѣ конгреси, опредѣля временния имъ дневенъ редъ и дава всѣка година отчетъ за дѣлата и състоянието на Съюза.

Чл. 29. Когато Управителниятъ съветъ по една или друга причина си подаде оставката, длъженъ е да изпълнява длъжността си до избирание новъ такъвъ.

Чл. 30. Събранията на Управителния съветъ се считатъ за законни, ако присѣствуватъ поне четири члена.

Чл. 31. Председателтъ на Управителния съветъ представлява Съюза въ отношенията му съ други дружества и учреждения.

Чл. 32. Секретартъ води дѣлата на Управителния съветъ.

Чл. 33. Касиертъ раздава само тѣзи суми, за които реши съветтъ. Той не може да държи у себе си повече отъ 500 лева. Остатъка той внася въ пощенската чекова смѣтка.

Забележка: По решение на Управителния съветъ горнитѣ две длъжности могатъ да се слѣятъ въ една: секретаръ-касиеръ.

Чл. 34. Управителниятъ съветъ решава какви книги да се водятъ.

Чл. 35. Управителниятъ съветъ изработва правилникъ за своитѣ функции и на всички съюзни комитети.

Чл. 36. Годишният конгресъ избира измежду членоветъ, живѣещи въ София, тричлененъ провѣрителенъ съветъ, който да прави тримесечни и внезапни ревизии на дѣлата на Управителния съветъ, да подписва кочанитѣ, отъ които се издаватъ квитанции и да провѣрява тримесечнитѣ, полугодишнитѣ и годишнитѣ финансови отчети на Управителния съветъ.

Чл. 37. Провѣрителниятъ съветъ, ако намѣри за нужно, може да прави ревизия и по искането на нѣкои дружества.

Чл. 38. При всѣка ревизия и завѣрка се съставя протоколъ, който може, ако провѣрителниятъ съветъ намѣри за нужно, да се публикува въ органа или да се съобщи по другъ начинъ на членоветѣ.

Чл. 39. Провѣрителниятъ съветъ дава отчетъ за дейността си предъ конгреса. Членоветѣ на Провѣрителния съветъ сж по право делегати на конгреса. По своитѣ дѣла тѣ нѣматъ право да гласуватъ.

#### ГЛАВА V. — КОНГРЕСИ, НАУЧЕНЪ КОМИТЕТЪ

Чл. 40. Съюзнитѣ събрания биватъ конгреси и конференции.

Чл. 41. Конгреситѣ сж редовни и извънредни. Свикватъ се или отъ Управителния съветъ или по желание на повече отъ половината на съюзнитѣ членове.

Чл. 42. Конгреситѣ се свикватъ по възможностъ всѣка година въ разни градове. Управителниятъ съветъ опредѣля два месеца по-рано датата и града на конгреса и представя уреждането му на единъ комитетъ, избранъ отъ мѣстнитѣ членове, дето ще се състои конгресътъ.

Чл. 43. Извънреднитѣ конгреси се свикватъ, когато Управителниятъ съветъ намѣри това за необходимо, по искането на Провѣрителния съветъ или по мотивирано писмено желание на една трета отъ редовнитѣ членове. Инициаторитѣ опредѣлятъ както дневния редъ, така сжщо мѣстото и датата на конгреса.

Чл. 44. — За свикването на годишния конгресъ, датата и мѣстото се съобщава чрезъ органа и окръжни най-малко единъ месецъ по-рано, а привременниятъ дневенъ редъ — 15 дена по-рано.

Чл. 45. Предложенията на членоветѣ по дневния редъ се внасятъ чрезъ Управителния съветъ най-малко единъ месецъ по-рано, а съветътъ ги съобщава на всички членове.

Чл. 46. Нѣколко дружества могатъ да си уреждатъ мѣстни конференции съ разрешението на Управителния съветъ, въ който да се разискватъ въпроси отъ мѣстенъ характеръ, да се подготвятъ по въпроси за конгреса, или да се вземе решение да се предложи нѣщо на последния.

Чл. 47. Конгреситѣ и конференциитѣ избиратъ свои бюра и опредѣлятъ окончателния дневенъ редъ. Конгресътъ е властенъ да разреши дали членъ отъ Управителния съветъ може да бжде членъ на конгресното бюро.

Чл. 48. Решенията се взематъ съ абсолютно болшинство, а при повече предложения съ относително болшинство.

Чл. 49. Членоветѣ на Управителния съветъ сж по право делегати на конгреса. По своитѣ дѣла тѣ нѣматъ право на гласуване.

Чл. 50. Задачитѣ на конгреса сж: а) да приема отчета на Управителния съветъ и да го освободи отъ отговорностъ, б) да избира новъ Управителенъ съветъ и Провѣрителенъ съветъ, в) да взема решения по предложенията за измѣнение на устава и по всички организационни въпроси, г) да се произнася по дейността на разни съюзни комитети, д) да фиксира въ общи черти деятелността за идната година, е) да опредѣля бюджета на Съюза.

Чл. 51. Когато има голѣма нужда и не може да се свика конгресъ, тогава решението се взема чрезъ писмено гласуване отъ дружествата.

Чл. 52. При писмено гласуване пликветѣ се отварятъ отъ Провѣрителния съветъ.

Чл. 53. Управителниятъ съветъ се подпомага въ своята научна работа отъ „Наученъ комитетъ“, правилникъ на който се изработва отъ Управителния съветъ.



## ГЛАВА VI. — ИЗМЪНЕНИЕ НА УСТАВА

Чл. 54. Предложения за измънението на устава се внасят писмено чрезъ Управителния съветъ отъ дружествата. Предложителитѣ трѣбва да формулиратъ измъненията, които искатъ да направятъ.

Чл. 55. Измъненията се приематъ, ако за тѣхъ сж гласували две трети отъ присъстващитѣ делегати.

Чл. 56. Целта на Съюза и настоящиятъ членъ не подлежатъ на измънение.

## ГЛАВА VII. — ОБЩИ РАЗПОРЕДБИ

Чл. 57. Печатътъ на Съюза е кржгълъ, въ срѣдата петолжчна звезда, а наоколо надписъ „Булгара есперантиста асоцио“.

Чл. 58. Печатътъ се пази отъ секретаря на Управителния съветъ.

Чл. 59. Ако Съюзътъ или нѣкое дружество престане да сществува, дружествата предаватъ всичко на Съюза или на сродна мѣстна културно-просвѣтна организация, а Съюзътъ — на Министерството на народното просвѣщение или на нѣкоя сродна културно-просвѣтна организация, при условие, че при възобновяване на дружеството или на Съюза всичко ще се възвърне.

Чл. 60. Първоначалниятъ уставъ е приетъ въ учредителното събрание на 25. септемврий 1911. година и е въ сила отъ 1. октомврий сжщата година. Следъ това е билъ утвърденъ отъ Министерството на народното просвѣщение съ заповѣдь № 5150 отъ 11. декемврий 1914 година. Измъненъ отъ VIII-я конгресъ на българскитѣ експерантисти въ 1921. година и утвърденъ отъ сжщото Министерство съ заповѣдь № 4494 отъ 23. IX. 1921. г. Измъненъ отъ IX, X и XI конгреси на бълг. есперантисти въ годинитѣ 1922, 1923. и 1924. и утвърденъ отъ Министерството на вжтрешнитѣ работи и народното здраве съ заповѣдь № 6346 отъ 10. XII. 1924. год. Измъненъ отъ XIV-я конгресъ на бълг. есперантисти, състоялъ се въ Пловдивъ въ днитѣ 14—16 августъ 1927. год. и утвърденъ отъ Министерството на вжтрешнитѣ работи и народното здраве съ заповѣдь № 13423 отъ 25. X. 1932. г. Измъненъ чл. 14. отъ устава отъ XXII-я конгресъ на бълг. есперантисти въ Варна презъ 1935. год. и измънението утвърдено съ предписание № 22518/IV отъ 12. XII. 1935. год. на Министерството на вжтрешнитѣ работи и народното здраве.

Настоящиятъ текстъ е основанъ на решението на XXVI-я конгресъ на българскитѣ есперантисти, състоялъ се въ Плѣвненъ въ днитѣ 26—28. августъ 1939. година.

Уставътъ е утвърденъ отъ Министерството на вжтрешнитѣ работи и нар. здраве съ заповѣдь № 4271 отъ 19. декемврий 1939. год.

---

**Съидейници, платете си абонамента! На нередовнитѣ абонати следниятъ брой нѣма да се изпрати.**

---

## EDISON KAJ LA DORMO

Edison kutimis dormi malmulte. Foje demandis lin iu el liaj asistantoj, kiel li kapblas tiel multe labori, dormante tiel malmulte. Edison respondis:

— La kuracistoj, kiuj preskribas multe da dormo, estas ĉarlatanoj. Mi ne konas eĉ unu kazon, ke longa dormado donis utilon. Jen mi rakontos al vi unu aferon el mia propra vivo. Kaj poste vi povos mem juĝi.

Dum iu nokto mi vekigis pro ia bruo.

Mi intencis endormiĝi denove, sed en la malmultaj momentoj, de kiam mi vekigis, tra mia cerbo trafulmis ideo, kiun mi klopodis fiksteni. Dum kelkaj minutoj batalinte kontraŭ la dormo, mi levigis kaj komencis analizi mian ideon. Tiam mi trovis la fundamentan penson, kiu ebligis al mi inventi la gramofon. Se mi estus, en tiu nokto, cedinta al la dormo, tiu ĉi instrumento — la gramofono — verŝajne ankoraŭ ne estus inventinta.

IVAN ESPEROV

## Granda esperantista konferenco en Plovdiv

La verda frataro en Bulgario neniam forgesis sian homaman devon kaj ne ĉesas laboradi por la efektivigo de la interna ideo de nia Majstro. Tion montras al ni la III-a sud-bulgara konferenco esperantista, okazinta la 5-an de majo j. k. en Plovdiv, okaze la foiro, kaj dum la tre malĝoja tempo, kiam la sangonverŝa milito detruas senkompate la kulturon tutthomaran.

donis la iniciaton por la nuna konferenco kaj koncize montris la grandan rolon de Esperanto kiel kultura kaj fratiga faktoro. Post tio oni elektis por sekretario Ivan Dimitrov—Sofia kaj por rezolucia komisiono Iv. K. Vasilev—Pazarĝik, Pamporov—Sofia kaj Z. Zaprjanov—Plovdiv.

La konferencon salutis s-ano Iv. Ŝivarov je la nomo de la societo de la verkistoj en la provinco, s-ano A. Ivanov —



La partoprenintoj-delegitoj kaj gastoj en la Plovdiva konferenco

Neniu kuraĝis supozi kaj antaŭvidi tian grandan sukceson! Eĉ la organizintoj mem — la plovdivaj gesamideanoj. Oni nomis la konferencon tutbulgaran, ĉar ĝin ĉeestis ĉirkaŭ 200 pacaj batalantoj el la tuta lando. La tagordo estis la jena: 1) Malfermo kun parolado kaj salutoj. 2) Raportoj de la delegitoj pri la esper.—movado laŭloke. 3) Opinioj por plivigligo de la movado.

La konferencon prezidis s-ano Penko Stoev — prezidanto de societo „Kulturo“—Plovdiv. En sia parolado li dankis al la sam-anoj el Pazarĝik pro tio, ke ili

je la nomo de la redakcio de g. „Zarja“, s-ano N. Kirilov — de la fervojista esper.—grupo—Sofia.

Poste sekvis la raportoj kaj la opinioj de la ĉeestantoj. Parolis multaj samideanoj: Sasonov—Asenovgrad, Iv. Vasilev—Pazarĝik, A. Vaĉev—Trojan, Iv. Strahinov—Panagjuriŝte, G. Georgiev—Varna, T. Aslanjan—Burgas, St. Lambov—Sliven, K. Vâlev—Sofia, Sl. Georgiev—Plovdiv, Iv. Dimitrov, Pilosov, A. Ivanov — Sofia k.a. Ĉiuj konstatis, ke nia movado ne estas vigla pro la nunaj cirkonstancoj, pro la manko de rajtkapablaj kursgvidantoj

kaj la granda 2,000 lv. takso k. t. p. La plej viglaj esp.-societoj estas la Sofia kaj tiu en Varna. Por plivigliĝo de la movado oni rekomendis: la senlektorajn esp.-kursojn, la enlandan intersocietan korespondadon, laboron por neniigo de la leĝ-ordono por la lektoroj, plimultigon de la membroj de B. E. Asocio, regulan eldonadon de la organo „B. E.“ unuigon de ĉiuj fortoj k. t. p.

Al ĉiuj bone respondis la sekretario de B. E. A. — s-ano B. Oktomvrijski, kiu

donis kelkajn klarigojn kaj montris la malbonan staton de nia „Bulgara Esperantisto“ — la malmultaj abonoj. Tuj la ĉeestintoj kolektis monon kiel fonduso — ĉirkaŭ 508 lv. Post la tralego de la rezolucio, skribita laŭ la paroloj, oni fermis per la esper.-himno la konferencon, kiu, oni decidis, estu tradicia. Surstrate ĉiuj faris foton kaj disiĝis entuziasmigitaj, kun dezirego daŭrigi la laboron por nia fina venko.

## КОНГРЕСЕНЪ КОМИТЕТЪ

на

### 27-я КОНГРЕСЪ

на

## българскитѣ есперантисти ЛОВЕЧЪ

## Конгресенъ бюлетинъ

### Драги съидейници,

#### I.

Поради това, че Ц. К. на Б. Е. С. намира по-рано известната дата — 4, 5 и 6 май за неподходяща и ненавременна за свикване на конгреса ни, то Конгресниятъ комитетъ реши и Съюзътъ одобри:

**27-ятъ конгресъ на българскитѣ есперантисти да стане на 12, 13 и 14 юлий т. г. при следната програма:**

На 12 (Петровденъ) посрещане на есперантиститѣ и опознавателна вечеръ.

На 13 (сѣбота) следъ обѣдъ откриване на конгреса и заседание на комисиитѣ.

На 14 (недѣля) — заседание на всички делегати, а следъ обѣдъ разглеждане околноститѣ на града.

На 15 (понедѣльникъ) се урежда, при желание, екскурзия до прочутата „Девешка пещера“.

Конгресна такса за ученици и работници — 10 лв., за чиновници и др. — 15 лв.

По-подробно конгресната програма ще бѣде обявена въ последствие.

Искайте сведения отъ Конгресния комитетъ:

Ловечъ, ул. „Търговска“ № 183.

#### II.

Конгресниятъ комитетъ възнамѣрява да устрои презъ време на конгреса **голѣма есперантска изложба** отъ стари и нови броеве на есперантски вестници и списания, скици, рисунки, интересни писма отъ чужбина и др. Въ изложбата ще бѣдатъ застъпени въздържание, туризъмъ, филателия и др.

Конгресниятъ комитетъ отправя гореща молба до всички есперантисти въ България, които иматъ стари и нови броеве на вестници и списания, интересни писма изъ своята кореспонденция, хубави изгледи и пропагандични марки на есперанто отъ различни държави, брошури и книги за и на есперанто, издадени въ България и чужбина и други подходящи материали за сѣщата целъ, да ги изпратятъ на К. К., като следъ изложбата ще имъ бѣдатъ върнати, грижливо запазени.

## Ni ne forgesu la veteranojn!

S-ro R. K. Tričkov en „Bulgara Esperantisto“ № 9—10 1938 skribas: „Ni ŝuldas honoron al la patriarko de nia enlanda movado“. Tiu ĉi demando meritas atenton de ĉiuj bulgaraj geeperantistoj, tamen ĝis nun neniu samideano bonvolis subteni lian proponon.

Mi atendis aŭdi la opinion de aliaj pli kompetentaj s-noj, ĉu la proponon „Ni ne forgesu la veteranojn!“ meritas atenton aŭ ne. Mi estas tute surprizita, ke ĝis nun neniu bonvolis defendi la proponon de s-no Tričkov, kaj tre bedaŭras, ke oni restas tute indiferentaj rilate tiel aktuala demando.

Por mi la propono de s-ano Tričkov ne estas io nova. En la kongresa komitato de nia XXIV — dum 1936, okazinta en nia urbo, mi ankaŭ metis unu punkton. En tiu punkto mi volus levi la demandon kiamaniere ni montru nian dankon kaj honoron al la veteranoj de nia

enlanda movado. Tiu ĉi punkto bedaŭrinde ni ne povis plenumi pro manko de mono kaj tempo.

Ĉar tiu ĉi mia deziro ne povis efektiviĝi, do mi ankaŭ nun faras mian proponon: C. K. de B. E. A. mendi specialan honorinsignon. Tiu ĉi honorinsigno estu pendigota sur la brusto de ĉiu meritinta malnova veterano en nia enlanda esperanto-movado je speciala ceremonio (en venontaj kongresoj) antaŭ esperantista kaj ne esperantista publiko. Same en „B.E.“ sinsekve estu publikigitaj la nomoj kun portretoj de ĉiuj veteranoj de nia enlanda movado. Ĉu la propono de s-ano Tričkov efektiviĝos, tio dependas nur de la C. K. de BEA, kaj la lastan vorton havas nur la C.K. de BEA.

Subtenante la proponon de s-ano Tričkov, mi esperas, ke tiu ĉi ideo estos efektivigota.

*Ivan K. Vasilev*

## Galerio de veteranoj


Petr Jordanov naskiĝis 1884 en Tirnovo, malnova lulilo de l'esperantismo en nia lando.

Li lernis esperanton dum 1901 j. La internacia korespondado donis al li eblon perfektigi sian stilon kaj en 1902 j. li fariĝis sekretario de la esperanto-klubo „Aŭroro“ en Sofia. Tiutempe li gvidis kelkajn esperanto-kursojn, faris propagandajn paroladojn kaj redaktis kune kun G. Oreškov la revuon „Rondiranto“.

Ĉirkaŭ jaro 1907 P. Jordanov estis kontablisto de la Rila monaĥejo; en la Rila montaro li verkis plurajn versaĵojn, kiuj tiam aperis en la revuo „Lumo“, eldonita en Tirnovo. Ĉirkaŭ jaro 1909—1910 li servis ĉe la universitata biblioteko en Sofia; tiam li denove gvidis kursojn en la ĉefurbo kaj partoprenis aktive en la gvidado de la tiama Sofia esperanto societo. En 1910 li denove iris en la Rilan monaĥejon; post 1910 li estis membro de la Centra komitato de la tiama Bulgara esperanto ligo (kiu poste transformiĝis en Bulgara esp. societo kaj depost

1926 estas kun la nuna nomo B. E. A.).

Post la mondmilito (1919) s-ano Jordanov kun nova entuziasmo daŭrigis sian pioniran laboron por esperanto.



Li tradukis la poemojn „Paisij“ de Iv. Vazov, „Haĝi Dimitro“ de Hr. Botjov kaj verkis kelkajn originalajn versaĵojn.

Lia poezio estas saturita je melankolio kaj vivrezigno.

Li utiligis sian pozicion en la Sofia societo (li estas advokato) por ĉiel progresigi nian movadon.

Li prezidis du landajn esperanto-kongresojn kaj estis prezidanto de Bulgara Esperanto Asocio.

Li partoprenas aktive en la organizo de la Baha-ana movado en nia lando.

Nuntempe P. Jordanov estas respondeca redaktoro de „Bulgara esperantisto“.

La vojo de Petr Jordanov estas vojo de fidela Zamenhofano, vojo de brava adepto de la interna ideo de esperanto.

Sur tiu ĉi vojo de porpaca batalo firme paŝas la nova generacio!

\* \* \*

P. JORDANOV

## ELEGIO

Dediĉia al E.

De Vi mi deziras da larmoj kristalaj,  
Rigardon funebran pro dolor' al mi,  
Kaj koloron palan sur lipoj koralaj,  
En la lasta tago de l'vivo de mi.

De Vi mi postulas, ke Vi rememoru  
Ke malĝojon longe pro Vi mi suferis, —  
Animon malpacan mian Vi priploru,  
Ĉar la vivon tutan, Vin mi malesperis.

Mi deziras pri mi rememoron geste  
Vi portadu en kor', koro diamant',  
Vi flustru mallaŭte, konfesu honeste  
Kiel mi amegis Vin, pura brilant'.

Mi volas tombeteĉon, la tiaman horon,  
Ke Vi ĉirkaŭprenu kaj ploru sen' ĝen',  
Per rigard' smeralda enpenetru koron,  
Vian bildon vidos. Vi tie en sven'.

Per paŝoj facilaj kun spikoj da floro,  
Kiun Vi portadis sur la blanka Brust',  
Al ĉielo levu la manojn en ploro  
Kaj pardonu diru al la tera rust'.

Mi aŭdos en tombo. Forflugos en mon-  
don  
Fajere ekbrilos kaj fariĝos stel',  
Spirito envenos ja en sian rondon  
Kaj, de vi amata, iros al ĉiel'.

## LINGVAJ DEMANDOJ

D. Kial la *ci*-uzo estas tre malofta en la Esperanta literaturo?

R. Kredeble pro tio ke la *ci*-diro tre varias laŭ la diversaj landoj. En Francujo oni uzas la pronomon *ci* (tu) por esprimi ian familiarecon, aŭ tre grandan respekton. La germanoj uzas, kiel alparolan pronomon, ne nur la pronomon *du* (familiare) por la singularo, aŭ *ihr* por la pluralo, sed ankaŭ la pluralan formon *Ihr* por la singularo (dialekte), la singularan trian personon *Er* aŭ virinsekse *Sie* (en pli fruaj tempoj, sed nuntempe ne plu), kaj fine (kaj tio estas nuntempe la kutimo inter ne-familianoj) la pluralan pronomon de la tria persono *Sie*, kun granda S, kiu signas apartan ĝentilecon. Sed la angloj,

en ĉiuj cirkonstancoj, por la singularo kaj por la pluralo, uzas nur *you* (vi) kaj preskaŭ neniam *Thou*. La esperantistoj imitas ilin; sed nenio malhelpas, ke oni uzu *ci* por indiki la familiarecon, kaj ke oni skribu *Vi*, per granda V, por signi ĝentilecon, kiam oni alparolas nur unu personon: „Kiel vi fartas, sinjoro? — Kiel Vi fartas, sinjorino?“

D. Kia diferenco estas inter: Norde la lago *bluas*, *bluiĝas* kaj *estas blua*?

R. *Estas blua* esprimas nur staton; *bluiĝas* signifas, ke norde la lago *fariĝas blua*, kia ĝi ne estis antaŭe, kaj la lago *bluas* signifas, ke ĝi *aspektas blua*, aŭ *impresas blue*.

H. Boucon

ELIN-PELIN

## Unu rondiro de Sankta Georgo

Sankta Georgo ĉirkaŭiris la kamparon, kiel ĉiun jaron, kiam por tio venis la tempo.

Li marŝis malrapide inter ja verdaj spikintaj agroj, kies ondoj ripozis ankoraŭ en la frua mateno. Ĉirkaŭkovrita en dika purpura mantelo, kiu ŝajne brulis pro la unuaj radioj de la suno, li moviĝis kiel iranta flamo, kaj lia ora aŭreolo kovris la diskon de la suno.

Liaj helaj junaj okuloj similis al smeraldoj, kaj en ili sin reflektis oratra verdaĵo, kiun ili ĉirkaŭprenis ĝis senlimeco. Sur lia kaŝtankolora bukla barbo brilis arĝenta polvo de roso.

La animo de la sanktulo ĝojis, ĉar ĉio ĉirkaŭe spiradis kaj vivis ĝuste laŭ la granda ordono de la Superulo. La malgrandaj birdetoj flugis kaj sin amis en sinforĝeso, pepadis, kisadis sin kaj triumfis. La etaj animaletoj tra la herbo tiel pasie estis fordonintaj sin al la granda forto, per kiu ilin dotis la Kreinto, ke ili mortadis pro senfortiĝo, aŭ reciproke sin disŝiradis pro ekstazo. Kunpariĝintaj papilioj sin portis facile super la verdaj spikoj kaj elĉerpitaj faladis sur la ŝultrojn de la sanktulo. Sur la malgrandaj floriĉaj kampejoj leporoj, fordonitaj al la emo de siaj koroj, ne aŭdis la fremdajn paŝojn kaj la eterna timo de la morto estis ilin forlasinta. Sur la arĝentteksitaj araneaĵoj tra la kratagoj impetege sin postsekvis ekscititaj paroj de araneoj kaj faris danĝerajn ludojn sur la maldikaj fadenoj. La fekundigitaj fruktarboj kun ĝuo tenis siajn ankoraŭ malmaturajn idojn kaj mildumis en ĝuo sub la radioj de la suo.

Fordoninta sin en meditadojn pri la granda providenco Dia kaj pri la fajra forto de la vivo, S-ta Georgo de tempo al tempo haltigadis siajn paŝojn kaj turniĝadis por ĉirkaŭrigardi la tutan kamparon. Kaj jen meze de tiu ĉi ore-smeralda plado li vidis du homajn figurojn, vestitajn bunte kaj gaje, kiuj similis al du grandaj irantaj floroj.

Sankta Georgo superpendigis manon super siajn okulojn kaj fiksis rigardon. Unu fra-

ŭlo marŝis vice kun unu juna knabino. Ili moviĝis malrapide kun mallevitaj kapoj, tiom proksime unu ĉe alia, ke la etaj fingroj de iliaj malsuprenlasitaj manoj apenaŭ sin tuŝis.

Ili silentis. La fraŭlo detempe altempe deŝiris tigon el ja grenkampo, tramordis ĝin kaj senkonscie ĝin ŝiris. La knabino surmetadis manplaton sur la junajn spikojn kaj, marŝante, karesadis ilin.

La sanktulo kuntiris la brovojn. Meze de tiu ĉi bruanta amo ĉirkaŭe, tiuj ĉi homoj nek sin ekrigardis, nek sin kisis. Tiu ĉi timema intertuŝo de iliaj etfingroj lin igis ekrideti.

— Kiaj hontemaj infanoj,—ekpensis li. Kio rigidigas tiel iliajn korojn? Jen, tiuj ĉi junaj homoj sin amas. Ili, enlogitaj, estas venintaj ĉi tien tiom frue por renkontiĝi dum ne estas en la kamparo homoj kaj nun hontas ekrigardi sin.

La sanktulo etendis sian puran manon kaj alvokis abeleton, kiu zumflugis tra la aero. Li diris al ĝi ion kaj ridetanta vidis, kiel ĝi iris al la enamiĝinta duopo.

La abeleto ekzumis ĉirkaŭ la kapo de la knabino, turnis sin ĉirkaŭ la kapo de la knabo kaj komencis ludi inter la vizaĝoj de la ambaŭ. Tiam ili turniĝis por ĝin vidi kaj ekrigardis sin en la okulojn.

Ili ambaŭ haltis. La abeleto flirt-tuŝis jen ĉi tiun, jen la alian. Ili ĝoje ekkrietis. Iliaj rigardoj pli ofte sin renkontis kaj la ebriiĝo pro la printempa ekscito ilin senkonsciigis.

La sanktulo estis haltinta meze de la kamparo kaj ridetanta amuziĝis. Kune kun li haltis ankaŭ la suno kaj malakcelis la matenon, por ke restu la kamparo plian tempon senhoma.

Sankta Georgo sendis ĉe la junajn unu buntan papilion. Ĝi ekdancis ĉirkaŭ ili. La gracilaj delikataj manoj de la virgulino eketendiĝis por ĝin kapti. La fraŭlo same etendis la siajn. Moviĝante tra la aero la du manparoj interplektis sin kaj sin kaptis.

Sankta Georgo sendis etan raŭpon por ekrampi sur la fĵeksiĝema korpo de la virgulino. La knabino timiĝis. Ŝi elkriis tranĉe kaj komencis sin retiri, sed la fir-

maj manoj de la fraŭlo ne lasis ŝin. Li manetendis por forigi la raŭpon kaj liaj brakoj sin volvis ĉirkaŭ la lumbon de la knabino.

Ludante tiel la fraŭlo kaj la knabino ekstaris ĉirkaŭprenitaj meze de la grenkampo. Ili okuloj brulis, iliaj animoj senfortiĝadis. Ili ambaŭ tremis, sed ne povis sidiĝi, ĉar la herbo estis malseka pro roso.

Kaj kiam S-ta Georgo vidis, ke ili pli forte kaj pli firme sin ĉirkaŭprenis, kiam li aŭdis la turmentajn kaj entuziasmajn kriojn de la amo, kiam vidis la proksimiĝintajn lipojn, li ekrapidis, pasis facile preter ili, sternis sur la rosan herbon sian grandan, dikan purpuran mantelon kaj malaperis.

La fraŭlo kaj la virgulino falis ĉirkaŭprenitaj sur la kovrilon.

Kaj la suno rekomencis sian altan vojon, kaj la kamparo eklumis per dieca ĝojo.

El la libro „Sub la monaĥeja vito“  
trad. D. Z. — *Miti*.

**Elin-Pelin** (pseŭdonimo de Dimitr Ivanov) multe ŝatata nuntempa bulgara beletristo. Naskiĝis en vil. Bajlovo (Sofijsko) dum 1878 j., studis gimnazion en

Sofia, ne sukcesante ĝin finstudi; sian literaturan disvolviĝon ŝuldas je aŭtodidakto. Plej frue li estis instruisto en sia naskvilaĝo, poste li estis oficisto en la Nacia biblioteko kaj nun estas direktoro de muzeo Ivan Vazov. Membro estas de la Unuiĝo de bulgaraj verkistoj. Elin-Pelin priskribas la sovaĝecon, ebriecon, malsatecon de la vilaĝano, sed lia amo al la vilaĝo ĉiam trovas en la humoro aŭ en la senpretendo, tiun tonon, kiu altrudas al la leganto kunsimpation al tiuj malriĉaj, perdiĝintaj aŭ kulpigitaj homoj.

Plei belaj liaj rakontoj estas: Lepo, Vidvo, Krimo, Spasova mogila, la gerakoj, Samodiva, Sur la sulko, Gasto, Igluka k. c. Li redaktis dum 1909 Slânĉogled (Helianto) kaj dum 1921 kune kun prof. Al. Balabanov — Razvigor, literatura gazeto. De li estas eldonitaj: Rakontoj, v. I. (1905); Cindro de miaj cigaredoj (humoreskoj, 1905); Rakontoj, v. II. (1911); Bukedo por la bravulo (humorpecoj, 1918); Nigraj rozoj, versaĵoj en prozo, 1928); Tero, rakonto, 1938; Somera tago, rakontoj; Cikoniaj nestoj; Mi... vi... li...; Sub la monaĥeja vito (rakontoj, 1933); Libro por infanoj: Reĝo Dikulo (Car Ŝiŝko, 1933); La edziĝfesto de Ruĵetolino (Svatbata na Ĉervenuška, 1933); Jan Bibian k. c.

## De 3,000 al 150,000 loĝantoj

Pli kaj pli ofte ni legis, dum la lastaj monatoj, en la gazetoj la nomon Murmansk. Ĝi estas la ĉiam senlaciga, bona haveno, kiun Ruslando posedas ĉe la Barents-Marĉo, parto de la Arkta oceano. Dum la mondmilito la rusoj konstruis fervojon de Leningrad al Murmansk, trans distancon de 1341 kilometroj! Murmansk pli kaj pli fariĝas unu el la ĉefaj havenoj, eble la ĉefa haveno, de tuta Sovetio. Oni vidas tion, komparante la statistikon. Antaŭ iom pli ol dudek jaroj Murmansk estis

mizera vilaĝo kun 3000 loĝantoj, nun ĝi havas pli ol 150,000. La loĝantaro de la tuta duoninsulo Kola, kies ĉefa urbo estas Murmansk, kreskis en la sama tempo de 15,000 al 300,000.

La akvoj en tiu regiono estas tre riĉaj je fiŝoj. Proksime de Kirovsk ekzistas ferminejoj. Grandaj akvofaloj estas utiligataj por produkti elektron. Malgraŭ ĝia norda situo, oni povas do nomi la regionon de Murmansk „lando de estonteco“.

El „Esperanto Internacia“.

## GUNĈO ST. GUNĈEV

La 2-an de junio tute neatendite, post mallonga akra krizo, mortis nia malnova samideano, redaktinto kaj eldoninto de esperanta biblioteko „Svetovnik“ en Pleven, kunlaborinto de „Bulgara esperantisto“ **Gunĉo St. Gunĉev**, kiu ankoraŭ kiel lernanto en oka klaso vizitis la internacian esperanto-kongreson en Helsinki, Finnlando.

Gunĉo Gunĉev naskiĝis la 9-an de marto 1904 j. en urbo Bela kiel unua filo de kuracista familio el Gabrovo. Li absolvis gimnazion en Pleven, studis poste geografion en Francujo, de kie revenis post unu jaro kaj finis sian amatan sciencan —la geografion— en nia ŝtata universitato



en Sofia. Kiel studento lin tre ŝatis prof. A. Iŝirkov, nia eminenta geografo, kiu foje estas dirinta pri li: „Gunĉev estas juna, sed scienculo kun sia propra stilo“. Kiel multpromesa kaj kapabla junulo Gunĉev estis sendita en Berlin, kie li funde studis kaj specialiĝis en la geografio ĉe eminentaj germanaj geografoj. Li revenis el Germanujo kiel bona kaj vera scienculo, kiun atendas senlima agado. Kaj li kun juna entuziasmo kaj verve komencis apliki siajn grandegajn sciojn. Unue li estis asistanto de geografio ĉe la universitato kaj

dum 1937 j. jam tre juna fariĝis docento de antropogeografio. La studentoj arde amis lin. Gunĉev antaŭ nelonge estis komencinta kolekti materialojn por sia nova sciencverko pri Sofia ebenaĵo por fariĝi eksterordinara profesoro, sed la morto ne permesis al nia kapablulo, kiu tre bone konis nian realecon kaj popolon, plenumi siajn taskojn kiel scienculo, kiel sociulo kaj kiel homo. Ni kaj nia scienco atendis tiom multe de li kaj li promesis tiom multe.

La homo, la scienculo, la neforgesebla amiko malaperis. Gunĉo Gunĉev mortis tre juna, 36-jaraĝa, en la komenco de sia scienca agado. En sia mallonga sciencagado Gunĉev skribis kelkajn seriozajn sciencverkojn: „Vilaĝo Vakarel“, antropogeografiaj esploroj, „La Kjustendila ebenaĵo“, La malaperintaj loĝadaj lokoj en Bulgarujo“, „Gabrovo kaj Gabrovska“ k.c. Krom tio Gunĉev fondis kaj estis redaktinto kaj eldoninto de la tre serioza scienca revuo „Arhivo por esploroj de loĝadaj lokoj“.

Gunĉo Gunĉev estis homo kun neelĉerpebla energio. Kiel kapabla lernanto kun diversaj flankaj interesoj li komencis vastan propagandon por esperanto buŝe — per paroladoj kaj skribe — per artikoloj, broŝuroj kaj libroj. Tiu ĉi vasta agado estis por li granda kaj vera lernejo, kiu donis al li tre favorajn postsekvojn. Li ankoraŭ tre juna jam estis grandskala sociulo. Esperanto donis al lia nobla karaktero pli da nobleco, honesteco kaj sincereco. Li estis adepto de la principo—ĉion por la aliaj, nenion por si mem. Malavare li disdonis sian riĉan animon. Gunĉev kunligis tre feliĉe esperanton kun sia estonta socia agado — la geografio. Tre ofte Gunĉev jam kiel scienculo-geografo substrekis ke esperanto donas al la junularo riĉan materialon por diversaj sciencoj, sed precipe por la geografio. Ĉar ĉiu scias, ke posedante esperanton, vi povas korespondi kun amikoj el ĉiuj ŝtatoj kaj kolekti interesajn sciojn pri popoloj, vilaĝoj, urboj, moroj, kutimoj, entute tio, kio estas inte-



resa por la geografio, kio estas la geografio mem.

Gunĉev aplikis tre ofte esperanton en sia vivo. Kiel geografo li veturis kelkfoje fremdlande. Tie esperanto estis utila por li. Kaj per esperanto li atingis facile tion, kion aliaj ne povis atingi kaj kio estis por ili neatingebla. Tion li povis fari en Amsterdam, Nederlando, en Bukarest, Rumanujo k. a.

La esperantistoj neniam forgesos Gunĉo Gunĉev, ĉar li kondukis honeste kaj serioze al esperanto-movado. Li neniam forgesis nian movadon, kiu estis por li la unua ŝtupo en lia socia vivo kaj en lia scienca agado. Li tre diferencigis de multaj niaj aliaj sociuloj, kiuj baldaŭ forgesas la movadon kaj rifuzas nomi sin esperantistoj.

Ne, Gunĉev en sia lasta horo ŝatis esperanton, estis regula membro de la Sofia esperanto societo, ricevis la revuon, estis membro de internaciaj esp.-organizaĵoj, vizitadis regule niajn esperanto-renkontojn, donis ĉian helpon al la esperanto-movado. Li ofte faris siajn saĝajn konsilojn por la bono kaj prospero de la lingvo internacia en nia iando. Li tute ne povis toleri malhonestajn homojn, kiuj faras tiom da malutilo kaj malbono al la ideaj movadoj kaj kiuj enpenetras en ties organizaĵoj. Gunĉev estis precipe honestulo.

Granda estas la perdo por la bulgara geografio kaj por la esperanto-movado.

Ĝermanan pacon al la juna scienculo, neforgesebla kaj nobla samideano Gunĉo Gunĉev.

I. S.

## EL LA PAROLADOJ DE NIA MAJSTRO

*La celo, por kiu ni laboras, povas esti atingita per du vojoj: aŭ per la laborado de homoj privataj, t. e. de la popolaj amasoj, aŭ per dekreto de la registaroj. Plej kredeble nia afero estos atingita per la vojo unua, ĉar al tia*

*afero, kiel nia, la registaroj venas kun sia sankcio kaj helpo ordinare nur tiam, kiam ĉio estas jam tute preta.*

*(El la kongresparolado en Washington, 1910.)*

## LIBRARO

En la redakcio estas ricevataj jenaj libroj:

1. *Batalo*, rakontoj de Nikolaj Rajnov, el la bulgara lingvo tradukis At. Nikolov, eldonis „Frateco“ en Sevlievo, prezo 4 lv.

La libreto estas presita sur bela papero, en la komenco estas mallongaj biografiaj notoj pri la verkisto Nikolaj Rajnov. La traduko de la du rakontoj: „Batalo“ kaj „La malliberulo“ estas bona. Krom tio la rakontoj mem estas tre interesaj.

Ni rekomendas al niaj abonantoj tiun ĉi libreton.

2. *Fenestro al la mondo*, elekto kaj bulgarlingva traduko de esperantistaj leteroj el diversaj landoj kun ilustraĵoj kaj

klarigaj notoj. La libro estas № 2 de biblioteko „Verda stelo, redaktita de Sim. St. Hesapĉiev, gimnazia instruisto en Sevlievo. Prezo de la libro estas 8 lv. Ĝi povas esti bona propagandilo. Ni nur volas fari unu rimarkon: ĉu ne estus pli bone se la klarigaj notoj estus metitaj ne je la fino de la libro, sed ĉe ĉiu letero aparte. Krom tio estas dezirinde, ke la redaktinto estu pli zorgema rilate al la lingvaj eraroj, precipe pri la uzo de la artikolo en nominativo.

3. *Margarita antaŭ la juĝejo*, akuzo parolado kaj defenda parolado, de Sim. St. Hesapĉiev, Sevlievo, eldono de biblioteko „Verda stelo“, prezo 4 lv. Ni rekomendas la du libretojn al niaj abonantoj.

## ENLANDA KRONIKO

**Sofia.** Ofte „Saŭlo fariĝas Paŭlo“. Prof. D-ro Aleksandro Teodorov—Balan, kiu longtempe estis kontraŭulo de lingvo internacia kaj mokis esperanton, nomante ĝin parole kaj skribe „artefarita pupo“, „tranĉil-forketo“ k. s., la 26.IV.1940 vizitis s-ron Ivan H. Krestanov por akiri lian duoblan vortaron de esp. kun gramatiko por lerni la lingvon internacian, pri kies utiloj en vojaĝoj kaj korespondo li aŭdis kaj legis tiom multe. Fine la fama maljuna profesoro konvertiĝis kaj eklernis esperanton — „la artefaritan pupon“ kaj la „tranĉilforketon“, ankaŭ tiu fama Saŭlo fariĝis Paŭlo. Al kiu la vico?

S-ro Dim. Todorov, ĝenerala sekretario de la tutbulgara ligo „Otec Paisij“ paroladinte pri la bulgaroj en eksterlando, menciis, ke esperantistoj faras bonegan propagandon, korespondante kaj konatigante la eksteran mondon pri ni.

### Niaj mortintoj.

La 26-an de aprilo en Sofia mortis nia germana samideano

Hugo Bär.

Li estis unu el la malnovaj esperantistoj. Germano laŭ nacieco, li lernis esperanton en Dresden kaj partoprenis en la aranĝaj laboroj por la IV Universala Esperanto-kongreso. Edziĝinte kun bulgarino, li transloĝiĝis en nian landon kaj dum multaj jaroj partoprenis aktive en la organizacia vivo de la sofiaj esperantistoj.

Pacan ripozon kaj eternan memoron al li!

**Gabrovo.** Nia samideano Petr Kamburov sukcese gvidis tri kursojn, vizitataj de 120 personoj.

**Sevlievo.** Post la fermo de la kursoj de esperanto en Gabrovo, nun samideano Petr Kamburov malfermis esperanto-kurson en Sevlievo; partoprenas 40 personoj.

Приятно ни е да съобщимъ, че на 25 май т. г. въ с. Баня — Карловско нашиятъ съидейникъ Марко Марковъ отъ София се е сгодилъ съ симпатич-

ната г-ца Лизетъ Геронъ отъ Пловдивъ. Нашиятъ честитки.

### ОТНОСНО БИБЛИОГРАФИЯТА НА БЪЛГАРСКАТА ЕСПЕРАНТСКА ЛИТЕРАТУРА.

Библиографията на българската есперантска литература се подготвя усилено и се върва, че ще може да бжде готова до конгреса. Библиографията ше обхваща следнитъ отдѣли: 1. Книги на есперанто. 2. Книги за есперанто. 3. Учебници. 4. Речници и 5. Разни.

Умоляватъ се всички онѣзи съидейници, които сж намѣрили нѣкои непълноти въ първата часть, отпечатана въ края на Албума на българскитъ есперантисти, 1939, издаденъ отъ Спиктуръ, както и онѣзи, които иматъ нѣкои отъ книгитъ, които не сж подробно описани въ тази часть, или пъкъ иматъ нѣкои рѣдки стари книги, да изпратятъ книгитъ временно, или пъкъ поне да съобщятъ за тѣхъ на:

ЕМИЛЪ СТРАТЕВЪ

Алабинска 50 — София

**Pirdop.** — En la loka reala gimnazio, sub la prezido de s-ro direktoro Dim. Neov, malnova esperantisto, nia samideano Iv. Krestanov faris paroladon pri la fremdaj lingvoj kaj esperanto. La direktoro dankis en esperanto mem. Entuziasmigitaj la gelernantoj esprimis la deziron fondi rondeton kaj lerni esperanton.

■ Одно отъ най-добритъ помагала за изучаване и усъвършенствуване на международния езикъ е Есперантски синтаксисъ отъ Д-ръ Зах. Захариевъ. Цена 22 лева. Необходимо помагало за всички, които желаятъ основно да се запознаятъ съ граматиката и структурата на езика, за да могатъ правилно да говорятъ и пишатъ.

Не пропускайте случая да си го набавите на крайно намалената цена отъ 22 лв.

### САМО НА 10 ЛЕВА

Суми се превеждатъ чрезъ пощ. чекова с-ка № 3616 или чрезъ пощ или герб. марки.

Поржчки до: „СПИКТУР“ межд. институтъ 20, ул. Царь Калоянъ—София.

**Pleven.** — Nia juna samideano

**Dončo Anastasov**

26-jara el Pleven, mortis la 26-an de majo.  
Pacan dormon al li!

**Deziras korespondi:**

1) 19-jaraĝa Julio Matok, Ilona u 15, Szeged, Hungarlando, kun 16—19 jaraĝaj esperantistinoj.

2) La 12-jaraj geknaboj el la klaso de samideano Louis Dormont, St. Albans, New York, USA serĉas korespondantojn. La knaboj estas: Harris Norman 113—33 119 str. St. Albans; Viliam Robinson 114—28, 201 str. St. Albans; Robert Schaefer 118—01, 201 str. St. Albans; Harold Schumacher 113—22, 203 str. St. Albans; Robert Small 113—05, 202 str. St. Albans.

Knabinoj: Carol Seeler 200—20 Linden Blvd, St. Albans; Miriam Sheehan 113—07, 199 str. St. Albans; Jeanne Stocker 113—23, 202 str. St. Albans; Elaine Ugelow 144—64, 197 str. St. Albans; Mari Uhlendorf 112—08, 202 str. St. Albans.

3) 23 jara nederlandano Petro J. Hoeksel, Bruksloterdijk 172 Amsterdam (Norda) Nederlando, kun bulgaroj, prefere kun bulgarinoj, pri ĉiuj temoj, interŝanĝas poŝtmarkojn, fotojn k. t. p. escepte poŝtmarkojn.

4. F. Rieck, Köln, Lindenthal, Schnitzerstr. 20, Hermanujo, nur kun junaj bulgaraj geamikoj p.ĉ.t. ne pri politiko, interŝanĝas ilustr. poŝtkartojn.

5. 18 jaraĝa Ilmars Grinbergs, Pernavas iela 55—13, Riga, Latvujo.

6. 30 jara C. Veltkamp, Cambuursterpad 140, Leeuwarden, Holland, interŝanĝas p. m. kaj p. i.

7. Nederlandaj gesamideanoj volus korespondadi kun bulgaraj samideanoj pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝi bildgazetojn kaj poŝtmarkojn.

Adreso: C. Ooweneel, v. Zeggelensstraat 73 Haarlem, Nederlando.

8) F-ino Elsa de Graf 16-a jara, volas korespondi per leteroj kaj interŝanĝi poŝtkarkojn ilustritajn, sed poŝtmarkojn ne.

Adreso: Korte Marniekade 9 huis Amsterdam, Holland.

9. 18-jara kontoristo kun bulgarinoj pri diversaj temoj.

Adreso: Henk Voom, de Wittenstraat 56, Amsterdam—W., Holland.

10. Adr. Danen A 302, Oud Gastel, Nederlando, interŝanĝas poŝtmarkojn.

11. Krâstju Dinev, oficisto en komerca kaj transporta firmo, en vil. Stralĝa, Jambolsko, volas korespondi kun gesamideanoj el ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj, prefere kun tiaj laborantaj en similaj firmoj.

12. Kosta Rusev, elektrotekniko en vil. Stralĝa, Jambolsko, volas korespondi kun gesamideanoj el ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj, preferas laborantajn en elektraj entreprenoj kaj uzinoj.

■ Граматиката на есперанто е кратка, но за да може правилно да се говори и пише, нужно е всъкога човѣкъ да я има предъ очи. Необходимо рѣководство и справочникъ за стари и нови есперантисти е

**ПРАКТИЧНА ГРАМАТИКА НА  
ЕСПЕРАНТО**

отъ Емиль Стратевъ

60 страници — 6 лева

Набавете си я срещу 6 лв. пощенски марки отъ книжарницитѣ или направо отъ автора — София, Алабинска 50.

Конгресътъ на Българския есперантски съюзъ е разрешенъ отъ Министерството на вътрешнитѣ работи и нар. здраве съ предписание № 10298 отъ 7. VI. т. г.

Направени сж постѣпки за 50% намаление по Б. Д. Ж. За резултата ще се съобщи съ окръжно до дружествата и чрезъ пресата.

# HUMORO

## Ĉiam la sama firmo

Iohansen: Por kiu vi laboras nuntempe?

Petersen: Ho, ankoraŭ ĉiam por la samaj: mia edzino kaj miaj kvin infanoj.

## Samaj sentoj

— Senkulpigu min, sinjoro doktoro, mi estas tre nervoza, estas ja la unua fojo ke mi vizitas dentkuraciston.

— Nu, ankaŭ mi estas nervoza; vi nome estas la unua paciento, kiu min vizitas.

## Imago

— Mi asertas: ĉio estas imago. Mia edzo ekzemple diradas al mi ĉiutage, ke li absolute ne povus manĝi margarinon!

— Nu, kaj kio?

— Jam kvar jarojn li manĝadas margarinon!

## La terura infano

— Patro!

— Ne ĝenu min nun!

— Patro!

— Kion ci volas? Ci ja vidas ke mi ne havas tempon.

— Unu demandon, patro!

— Bone, kion ci volas scii?

— Diru al mi, patro: kiam vespo ekŝitas sur urtiko, ĉu tiam la vespo pikas la urtikon, au ĉu la urtiko pikas la vespon?

## Eĉ pli malbone

— Ĉu via edzo ne koleris, kiam li vidis la fakturon de la modistino?

— Jes, tre; li riproĉis min per la plej koleraĵoj.

— Kaj kiel vi sukcesis retransviligi lin?

— Per la fakturo de la ĉapelfaristino; kiam ĝin li vidis, li ne plu havis parolojn.

## Pli bone tiel

— Ĉu mi rakontu al ci fabelon? — demandis avino, dum ŝi enlitigis la nepeton.

— Ne, ne rakonti fabelon. . .

— Ĉu mi do kantu al ci dormkanton?

— Ne, ne kanti dormkanton. . .

— Kion mi do faru por ci, karuleto?

— demandis avino mirigite.

— Iru iom promeni kaj lasu min ekdormi!

## Egoisto

Li (revenante hejmen, al la edzino): Hodiaŭ mi asekuris mian vivon por centmil frankoj; ĉu vi ne estas kontenta?

Ŝi: Kiel kontenta? Ĉiam vi pensas nur pri vi mem, egoisto! Jen denove: vian vivon vi asekuris, la mian ne!

## La junulo scias

Konata bankisto diris al junulo fanfaronanta pri siaj kapabloj kaj scioj:

— Mi ne hontas konfesi ke mi ne multe scias pri la moderna scienco. Prenu ekzemple le elektran lumon: mi ne havas ideon kiamaniere ĝi funkcias.

— Nu, tio estas ja treege simpla, — respondis la junulo, — vi bezonas nur turni la butonon, kaj estos lumo!

**Есперанто ви разкрива широки хоризонти изъ цѣлия свѣтъ. Учете този езикъ, който ви създава приятели по всички краища на земята. Есперанто допринася много за създаване мирни и дружелюбни отношения между хората.**

**„BULGARA ESPERANTISTO“** —  
monata organo de la Bulg. Esp. Asocio.  
Adreso: 50, str. Aabin, Sofia, Bugarujo.  
Poŝtĉekkonto: 1133

**JARABONO:** Enlande — 20 bugl. le-  
voj. Eksterlande — 4 respondkuponoj aŭ  
egalvaloro.  
Anoncoj: 1 kv. cm. — 1 levon  
**RESP. REDAKTORO: P. JORDANOV**

ПЕЧАТНИЦА „ХУДОЖНИКЪ“ — СОФИЯ — ESPERANTO-PRESEJO „ХУДОЖНИК“ — СОФИЯ-2